De la Federación Española de Esperanto

AÑO 39 Nº 280 MAYO—JUNIO 1987



1887

—

1987

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Directora: María Aurora Viloria

Dirección y administración
Carreras Candi, 34 – 36
08028 BARCELONA

REDACTOR JEFE
Giordano Moya
Balmes, 38 Tel. (93) 7881839
TERRASSA (Barcelona)

COMITE DE REDACCION
Vicente Hernández Llusera
Gabriel Mora i Arana
Andrés Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Marco Botella

Jarabono . . . . . . . . . . . . 1500 p-toj

## ENHAVO

La kovrilo: L. L. Zamenhof

| | Paĝo |
|---|---|
| Pensoj de Zamenhof | 3 |
| Faktoj pri la neuzado de "ci" | 4 |
| HURA! | 8 |
| Fundación Esperanto | 12 |
| Fondaĵo Luiso Mimo | 14 |
| Paĝoj el la hispana beletro | 15 |
| HEF – Sidejo en Barcelono | 17 |
| Fideleco | 18 |
| Esperanto kaj Olimpiaj Ludoj 1992 | 20 |

**Depósito Legal: VA. 616 – 1978**
**G.E.T.**

## UTILAJ ADRESOJ

Hispana Esperanto-Federacio
Carreras Candi, 34-36
Tel. (93) 240 26 62
08028 BARCELONA

PREZIDANTO. Salvador Aragay

VICPREZIDANTO. Luis María Hernández

SEKRETARIO. Víctor Ruiz

VICSEKRETARIO. Josep Miranda

KASISTO. Joan Font

Pagojn sendu al
Caja de Pensiones para la Vejez y de Ahorros. Libreta núm. 2.303-26
Agencia Riera Blanca, 436
08028 BARCELONA

JUNULARA SEKCIO (H.E.J.S.)
Sol, 75
41003 - SEVILLA

FERVOJISTA SEKCIO (H.E.F.A.)
Ronda S. Antonio 46-50, 2º 4º
08001 BARCELONA

TURISMA SEKCIO KAJ ELDONA FAKO kaj "FUNDACION ESPERANTO"
Inés Gastón
Pº de la Constitución 35, 4º
5001 ZARAGOZA

LIBRO–SERVO
Luis Hernández García
Apartado 119
47080 VALLADOLID
Pagojn por LIBRO–SERVO
Cuenta Postal 3.118.078 VALLADOLID

ĈEFDELEGITO DE U.E.A. EN HISPANUJO
Juan Azcuenaga Vierna
Gral. Dávila 127, portal 7, 2º izda.
Tel. (942) 33 94 87
Cuenta Postal 03548531
39007 SANTANDER

OFICEJO
Rodríguez San Pedro, 13, 3º P-7
28015 MADRID

INFORMA OFICEJO
Julio Herrero
Nontecorto 9, 3º 16ª
29014 MALAGA

# PENSOJ DE ZAMENHOF

**EL GAZETARTIKOLO EL "LA ESPERANTISTO" 1895. N-ro 93**
**PRI NIA LITERATURO**

Ĉu la fakto, ke laŭ la deziro kaj inklinoj de la pliparto nia agado devis akcepti formon de la nuna "Biblioteko" kaj ne alian formon, estas bedaŭrinda? Se nia agado eĉ ne dependus de la gusto de la pliparto, kiun ni konas bone, ni ankaŭ ne devus elekti alian formon ol la nuna, kvankam ni eble iom ŝanĝus ĝin en detaloj. Lernolibroj, anoncado, ktp. estas necesaj, sed literaturo estas ankaŭ necesa, ne malpli, sed eĉ multe pli. Kiu legas la motivojn, kiujn la indiferenta mondo, precipe la instruituloj-teoriuloj, elmetas kontraŭ nia afero, tiu rimarkis, ke la plej ofta kaj eĉ preskaŭ la sola ŝajne peza batalilo, per kiu oni volas neniigi en la okuloj de la mondo, estas la opinio, ke nia lingvo estas ia nenatura kreitaĵo, malriĉa kaj nefleksebla, kiu "taŭgas nur por esprimi apartajn mallongajn pensojn, por rilatoj poŝta-telegrafaj, por lama rimedo en alilandaj hoteloj ktp., sed neniam povas servi kiel lingvo por libera esprimado de ĉiuj geniaj verkoj de la homa literaturo". Kontraŭ tiu ĉi senfundamenta opinio, kiu en la praktiko estas nia plej grava malamiko, ni povas batali nur per faktoj, nur kaj nur per riĉigado de nia literaturo. La batalantoj por nia ideo jam longe konvinkiĝis, ke ĉiu nova grava verko, kiun ni povas montri al la publiko efikas sur ĝin pli, ol ĉiaj plej lertaj teoriaj paroloj.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Agadi per lernolibroj, anoncoj ktp. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon apud la literaturo kaj ne anstataŭ la literaturo. Ni iru ankoraŭ plu: se ni eĉ supozus, ke la agado per lernolibroj kaj anoncoj devas esti nia sola celo, — eĉ tiam, jes, eĉ tiam ni atingus eĉ tiun ĉi celon mem la plej prospere nur per la "Biblioteko" kun ĝiaj verkoj en Esperanto.

---

**INTERNACIE**

VERDA STELO. Antaŭkongresa montara migrado en amikeca esperantista grupo, 18a ĝis 24a, julio 1987. Esperanto Verda Stelo, 87 SKR. POCZT. 104. PL–33–300 NOWY SACZ 5. Pollando.

# FAKTOJ PRI LA NEUZADO DE "CI"

**Bernard Golden**

En sia artikolo "Humana hurlo" (**Venezuela Stelo**, 1984, n-ro 31, pĝ. 10–11) Espartako Gabalda faras la aserton, ke "se esperantistoj ne ciumas estas tute simple, ĉar oni kaŝas al ili la ekziston mem de 'ci'." Ĝis nun mi ne aŭdis, ke "ci" estas speco de tabuvorto en Esperanto. Ansataŭ spekulativi, ĉu esperantistoj "kredas, ke ĝi estas nekonvena neologismo" aŭ ke ili malkovras ĝin post longa uzado de "vi", ni rigardu en kelkajn modernajn lernolibrojn por ekscii, ĉu la aŭtoroj efektive provas "kaŝi" tiun pronomon.

W. J. Downes, membro de la Akademio de Esperanto, en sia anglalingva lernolibro **Esperanto, the International Language** (Londono, 1983) listigas la personajn pronomojn sur pĝ. 14 kaj aldonas jenan noton: "ci" estas tre malofte uzata; "vi" estas uzata por "you" singulara kaj plurala. Sur pĝ. 18 la posedaj pronomoj inkludas ankaŭ "cia" (**thy, thine**) sen plua komento aŭ ekzemplo de la uzo.

István Szerdahelyi estas konata ĉie en Esperantujo pro sia laboro sur la tereno de la instrumetodologio de Esperanto. Li verkis tre sukcesan lernolibron por junuloj inter 10 kaj 14 jaroj. En la unua volumo (**Eszperantó Nyelvkönyv**, Budapeŝto, 1966) la pronomoj "mi, vi, li, ŝi, ĝi" aperas jam en la dua leciono. En P. 27 de la gramatiko troviĝas jena noto: "La ciuma pronomo: "ci" = **te** ne estas uzata; nur se ĝi estas esenca en literaturaj tradukoj (cidiri = **tegezni**)." Ankoraŭfoje ni vidas, ke ne estas iu komploto "kaŝi" la ekziston de "ci".

Furora lernilo por hungaroj estas **30 nap alatt eszperantóul** (Esperanto en 30 tagoj) de Jozefo Horváth (Budapeŝto, 1979). La personaj pronomoj sur pĝ. 23 estas: vi (ci) – **te, ön** kaj vi – **ti, önok**. Rimarku, ke "ci" estas enkrampe presita. Sekvas jena klarigo: "En Esperanto ne estas aparta ciumado kaj viumado. Ĉiam estas uzata **vi**, kies signifo povas esti egale **te** aŭ **ön** en la singularo kaj **ti** aŭ **önök** en la pluralo. "Ci" = **te.** Tiu ĉi formo nur malofte aperas en literaturaj verkoj. Ĝi estas uzata, nur kiam ne estas klare en la teksto, ke temas pri ciumado aŭ viumado. En la ĉiutaga konversacia lingvo ĝi same neniam estas uzata." Ankaŭ tiu ĉi aŭtoro realece prezentas la funkcion de "ci" en la vivanta Esperanto.

Estas bedaŭrinde, ke nek s-ro Gabalda nek "la humana poeto" Jacques Prevert ne partoprenis en la enketo organizita de Zlatko Tišljar pri la ĉiutaga konversacia lingvo. En 1979 Tišljar ellaboris frekvencvortaron de la parolata Esperanto surbaze de surbendigitaj konversacioj de diverslandaj espe-

rantistoj, ĉefe en ĉiutagaj cirkonstancoj (**Frekvencmorfemaro de Parolata Esperanto**, Zagrebo, s.d.). Korpuso de proksimume 25.000 vortoj estis komputere prilaborita. Tiu materialo estis kompilita surbaze de konversacioj de plenkreskuloj, junuloj, infanoj kaj familiaj grupoj. Inter 14 diversaj gepatraj lingvoj parolataj de la partoprenantoj, mi opinias, ke nur la angla ne havas pronomon ekvivalentan al "ci". La listo de morfemoj montras, ke "vi" estis uzata 643 fojojn; ĝi havas la 14-an oftec-pozicion inter la 25.000 vortoj. Male, **"ci" ne estis uzata eĉ unu fojon!** Eĉ ne en la hejmaj konversacioj. Eĉ ne inter junuloj. Eĉ ne dum la legado de rakontoj al infanoj. Tiu statistiko estas multe pli elokventa ol la klarigoj verkitaj de la aŭtoroj de Esperantaj lernolibroj, ĉar ĝi montras, kiel vere statas la parolata lingvo en Esperantujo.

Nun ni turnu nin al la literaturo por kompari originalan tekston kun la Esperanta versio. Mi elektis unu el la klasikaĵoj de la hispanamerika literaturo, la romanon **Doña Bárbara** de Rómulo Gallegos. La venezuela esperantisto Fernando de Diego tradukis ĝin en Esperanton, kaj ĝi estis eldonita de Venezuela Esperanto-Asocio (Caracas, 1975). La hispana teksto estas de la eldono de Espasa-Calpe (Buenos Aires, 1969 – Colección Austral 168). En la hispana teksto ĉiuj indikoj de ciumado (pronomoj, verbaj fleksioj) estas substrekitaj.

pĝ.100-101

– ¡Luzardo! ¡Santos Luzardo! ¿**Tu** por aqui, chico?

Mas, como Santos no correspondiese a sus amistosas demostraciones, ya para abrazarlo, se detuvo frente a él y lo interpeló.

–¿No me conoc**es**?

–Pues, francamente...

–Recuerd**a**, chico. Procur**a** recordar... Mujiquita, chico! ¿No **te** acuerd**as** de Mujiquita? Condiscipulos en la Universidad, en el primer año de Derecho.

No lo recordaba; pero habría sido una crueldad dejarlo con los brazos abiertos (...)

–¿Y qué buscas por aqui?

–La Jefatura Civil. (...)

–**Has** de saber que est**ás** hablando con el secretario.

pĝ. 108-109

–Luzardo! Santos Luzardo! Ĉu vi ĉi tie?

Ĉar Santos ne respondis al tiaj amikaj elmontroj, la ekkrinto, jam preta por lin brakumi, detenis sian geston kaj demandis:

–Ĉu vi ne rekonas min?

–Nu... vere...

–Memoru, homo. Streĉu vian cerbon. Mi estas Mujiquita, homo! Ĉu vi ne memoras pri Mujiquita? Ni estis kunlernantoj ĉe la universitato, en la unua jaro de juro.

Santos ne memoris lin, sed pensis, ke estus kruele lasi lin kun la brakoj malfermitaj. (...)

–Kaj, kion vi serĉas ĉi tie?

–La prefektejon. (...)

–Sciu, vi parolas kun lia sekretario.

| | |
|---|---|
| — ¡Ah! ¿Sí? Pues celebro haberme tropezado **contigo** díjole Santos (...) | —Ĉu jes? Nu! Mi ĝojas, ke mi renkontis vin — diris Santos (...) |

En la hispana originalo estas pli da ciumado ol viumado en la Esperanto traduko: tri pronomoj (**tu, te, contigo**) kaj sep verbaj fleksioj. En la tradukita teksto "vi" aperas ses fojojn, "via" unu fojon, kaj ĉe unu el la imperativoj, "memoru", la pronomo "vi" estas subkomprenata. La esperantaj frazoj impresas tute nature, kaj oni povas kompreni la etoson de la konversacio inter du malnovaj konatuloj de la universitata tempo sen la bezono de "ci" en Esperanto. Provu relegi la tradukon, anstataŭigante "vi" per "ci". Ĉu la teksto estas pli signifplena? Ĉu vi komprenas ĝin pli profunde? Aŭ ĉu via oreloj ekvibras pro la konstanta, agacanta ci-ci-ado?

En sekva eseo mi dezirus pritrakti pli delikatan demandon: kiel traduki en Esperanton konversacion, en kiu la dialogantoj etnolingve "ĵonglas" per "vi" kaj "ci" por krei emocie ŝargitan etoson aŭ por emfazi sociajn diferencojn.

**Bernard Golden**

## DEZIRAS KORESPONDI

Sinkrone kun la Centjara Jubileo de Esperanto, viaj s-anoj el Irano, organizis serioze, kursojn por la publika lernado de Esperanto en la urbo Maŝhado. Ili bezonas diversajn lernolibrojn por uzi en la klazoj. Ili evidente atendos baldaŭ viajm helpaĵojn. Bv. sendi al jena adreso viajn sendaĵojn: **DJAVAD KAMALI.** Pars Phar, 91846—MASHHAD, IRANO. — — S-ro Krzysztof Maksgmowicz — 39 jaraĝa, kuracisto-kirurgo 91-315 LODZ — KS. Brzoski 36, m. 2. Pollando. — — Gustavo C. Morales — Dandel n-ro 209 — e/n Cobas y Banrutia — Dpto: A Beche G' bcoa" — C. HABANA — Cuba. — — Komencantino: Mery Ramos Rojas — Calixto García, 6 — REMEDIOS Villa Clara — Cuba. — — Mi serĉas letero-geamikojn — Heinz Siegel — DDR 9200 FREIBERG, DammstraBe 49 c. — — Kun hispanaj fraŭlinoj. Saman Mehran — No. 5 EAST GOLESTAN 2. sto SARBAZ squrar Kod 16 — NORTH MADZ. I. DIEH — TEHRAN — IRAN. — — S-ro Max Lainé — "Bellevue" 72470 CHAMPAGNÉ — Francio. — — Pri sporto, filatelio, turismo, fotografio kaj Esperanto. Ryszard Stempien — 33 YAROYN; Str: C; Sktodowskiey,9 59—840 **ZAWIDÓW. Pollando.** — — ...kun celo organizi esperantistan abstinenculan societon ni serĉas esperantistojn, aktive batalantajn kontraŭ alkohol — kaj nikotinuzado. Ni serĉas seriozajn kontaktojn kun abstinenculaj organizaĵoj de via lando pere de esperantistoj. Dankon! skribu al: Eugeno S. Perevertajlo SU-700000 Počtamt ab/k 140, Taŝkento UZBEKIO USSR.

# POEZIA ANGULO

## BÀRBARA

Memoru, Bàrbara
Pluvadis senĉese sur Breston tiun tagon
Kaj ci paŝis ridetanta
Gajmiena, ravita, malseka
Sub la pluvo

Memoru, Bàrbara
Pluvadis senĉese sur Breston
Kaj mi rekontis cin sur la Siam-strato
Ci ridetis
Kaj mi same ridetis

Memoru, Bàrbara
Ci kiun mi ne konis
Ci kiu ne konis min
Memoru

Memoru tamen tiun tagon
Ne forgesu
Viro sub pordego ŝirmis sin
Kaj li kriis cian nomon
Bàrbara

Kaj ci kuris al li sub la pluvo
Malseka, ravita, gajmiena
Kaj ci ĵetis cin en liajn brakojn
Memoru tion, Bàrbara

Kaj ne koleru al mi ke mi cidiras cin
Mi diras ci al ĉiuj kiujn mi amas
Eĉ se mi vidis ilin nur unufoje
Mi diras ci al ĉiuj kiuj amas
Eĉ se mi ne konas ilin

Memoru, Bàrbara
Ne forgesu
Tiun pluvon saĝan kaj feliĉan
Sur cia feliĉa vizaĝo
Sur tiu feliĉa urbo
Tiun pluvon sur la maro
Sur la arsenalo
Sur la ŝipo al Ouessant

Ho Bàrbara
Kiel stultaĉa la milito
Kiel fariĝis el ci nun
Sub tiu pluvo el fero
El fajro ŝtalo sango
Kaj tiu kiu premis cin en siaj brakoj
Amege
Ĉu li mortis, malaperis aŭ ankoraŭ vivas
Ho Bàrbara

Pluvadas senĉese sur Breston
Kiel pluvadis antaŭe
Sed ne plu estas same kaj ĉio difektiĝis
Estas funebra pluvo terura kaj malĝoja
Tio eĉ ne plu estas ŝtormo
El fajro ŝtalo sango
Tutsimple estas nuboj
Kiuj krevas kiel hundoj

Hundoj kiuj malaperas
Laŭ la fluanta akvo en Bresto
Kaj iras putri foren
Foren tre foren de Bresto
De kiu restas nenio.

*Jacques PREVERT (1900–1977)*
*(tradukis: Daniel LUEZ)*

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1986
PROZO. DUA PREMIO: F. KSAVERO MOLEONO

# HURA!

Sur la ŝtuparo konstruaĵa ekaŭdiĝis kelkajn minutojn post la fermiĝo de la stratpordo kvazaŭ retenataj subridoj. Ŝanceliĝante la junulo, kiu nur pene sin tenis, eligis ŝlosilujon kun pluraj ŝlosiloj el la poŝo, palpe serĉadis kaj mirakle eltrovis la ĝustan kaj ĝin enigis en ĝian truon. La pordo grincete ovriĝis kaj li envenis.

—Kia nokto! Kia nokto! Ha ha ha! Hi hi hi!

Stumble li paŝis al sia ĉambro en la tute vaka domo, kaj, eniĝinte ĝin, defaligis sur la plankon la jaketon kaj sin sovaĝe ĵetis sur la liton, sen ĉesi ridaĉi.

—Ha ha! Hi hi hi! Minimume — li ekkalkulis kun nelerta lango— kvar litrojn da biero mi el—... eltrinkis, kaj drinkis du tri viskiojn, ĉu ne? Ha ha ha! Kaj tiun glason da rumo, kiun mi englut—... glutis unutire! Ha ha ha!

Senĉese li rotaciadis sur la lito, jen prenante per unu mano la kapkusenon, jen lasante kruron falsobiĝi ĝis la planko, jen sencele rondrulante la okulojn.

—Mi estas absolute ebria, ebria kiel porko. Ne, prefere kiel lordo. Jes, kiel lordaĉo! Ha ha ha, kiel supersprita mi estas! Supersprita... kaj sola —li plormienis—. L' apetita blondulin' ne volis min akompani. Mi tute ne... ne komprenas la kialon. Ŝi timus mian perforton, se mi ebrius, sed nun mi perfortus neniun, ĉar ĉi-state... kion mi kapablus fari?

Li sin turnis sur la lito.

—Bum!

—Ha ha ha ha ha ha.

Freneza rido ekŝprucis el lia buŝo, kiam lia kontuzita kapo finfine rimarkis, ke tiun egan sono, kiu ĝenis liajn orelojn, kaŭzis lia propra korpo falinta sur la plankon. La tuta ĉambro ekruliĝis antaŭ liaj miraj okuloj, kaj li malfacile ekstariĝis, falpuŝiĝis kaj sin hazarde apogis sur la ŝrankopordo. Peze li sin trenis ĝis sur seĝo, kuŝigis la brakojn sur tablo kaj la kapon sur la brakoj.

—De kie mi venas? De tiu... ia trinkejo... drinkejo... kial mia kapo ne funkcias? Kiel mi atingis ĉi ĉambron? Ha ha ha! Mi ne kapablas rememori! Oni povus krevi de... sed la taverno? La Verda Pato... ne, Kato... jes, tio estas, Kato. Tie... hooo!

Subite li eksentis la kapon kvazaŭ premegata de enorma forto de interne. Li kunpremis la dentojn, ĝis la gingivo blankiĝis po sensangiĝo, kaj tio ŝajne iel helpis lin. Li plubalbutis.

—... tiu ĉambro... unu lito... kaj sur ĝi... ia virino... prostituitino... hura... Oho! Kial enŝteliĝis tiu vorto en... en mian sanan menson? Ha ha! —Ĉe plej eta stultaĵo li ne povis deteni la ridon—. Mi ne scias. Ĝi... ŝi... belega... eble pli ol la blondulino, kaj ne tiom timema pri mia amoro. Mi devas... iom min fridigi.

Kiel urso li leviĝis kaj eniris la banĉambron, ovris la kranon de la duŝilo kaj post eta hezito kuraĝe svingis la kapon en la glacian akvon. Kelkaj krioj kaj finite. Li refermis la kranon kaj kun iom pli klara cerbo, sed kun la sama amoka mieno impetis denove al la lito kaj de tie sin rulis al fotelo, sur kiu li eksidis.

—Hura, hura, hura!... jes, mi ekrememoras. Pluraj kapoj, Bumerango, kaj Dio... jes, ankaŭ Ginĝis-Ĥano. Kaj pluraj pliaj... ne gravas. Ili hurais al mi —li kuntiris la brovojn, la pasintaj bildoj ne fluis facile—. Vivu **Kiel Vi**! Brave, bravisime! Hura al **Kiel Vi**! Kaj neniam pli prave dirite! —en la kapo de **Kiel Vi** enĥiĝis unu plian fojon la huraoj kaj vivuoj el liaj kompanoj, kiuj al li sonis dolĉe lulaj—. Ili min laŭdis pro ia mia sukceso... pri kio? Pa, mi demandos ilin iam. Ha ha ha! Devi demandi iun, kion **mi** sukcesis! Hi hi! —li forviŝis du tri larmerojn proridajn el la okuloj, kaj sensis la manon humida—. Supozeble iu el ili min venigis ĉi tien, aŭ ne, mi ne memoras. Tiu ruĝa lampo... kaj la dancistinoj... la taverno... sed... ni ne restadis la tutan nokton en unu loko. Ni vagadis kiel trampoj, eĉ, estiel trampoj! Ha ha ha ha ha ha!

Li devis opinii tiun ŝercon la plej sprita, ĉar li longe ridaĉis ĝuante la maĉadon kaj remaĉadon de la vortuzo.

—En unu loko la viskio... en alia la biero, kaj la rumo, kaj en la sekva... aŭ eble en la antaŭa?... brando, ĝino, konjako... iu el tiuj... mi fordrinkis ĉion! Ĉu mi ne vetis kun iu pri io tia? Eble pri multa drinkado per unu tiro? Jes, ŝajnas al mi... ke jes — li kuŝigis la kapon sur la dorsapogilo de la fotelo—... kun Unikorno. Jes, mia kara amiko Unikorno... kaj li fine absolute abria! Ha ha ha! Kia bebeto! Ha ha ha!

Brue li ruktis kaj petis pardonon de eventuala nevidebla ĉeestanto, kio okazigis plian ridkaskadon.

—Sed, kie do —li sulkis la frunton kaj duonfermis la okulojn, duone pro la rememorpeno, duone pro la ebrio— mi vidis tiun virinon, kun kiu mi kuŝis? La blondulino... tiun mi vidis ie... eble eĉ dancis kun ŝi... jes, dancis. La alia... kie mi trafis la alian? Kaj, kie estis miaj kompanoj. Ĵokero, Unikorno, kaj ĉiuj ceteraj? Ili venis kun mi? Kie mi la lastan fojon vidis ilin?

Amasiĝis tia monto da demandoj en la turniĝema kapo de **Kiel Vi** en kelkaj sekundoj, ke ĝin eksentis ekkrevi. Provis vakigi el pensoj la kapon por momento, kaj sukcesis, kio lin savis el la pelmelo inte estigita.

—Hura, hura, hura! Hura al **Kiel Vi**! —al li plaĉis elparoli tiun vorton laŭ-

te, simultane revekante la delicajn momentojn–. Hura. Hura –li prononcis pli softe–. Hura! –li kriis–. Mi estas la plej bona, mi sukcesis! Pri libroj? Jes, io tia, iu mia verko, ne gravas nun. Ili ĉiuj al mi hurais... Bumerango... eĉ la majstra Ginĝis-Ĥano! Hura! Kiel bela vorto, la plej bela en la mondo! Hura, hura kaj hura!

Kun plenbuŝa rideto kaj forta kapdoloro li provis sin kvietigi por elĝui frande sian venkan sukceson kaj la agrablajn rememorojn el la ĵus trapasita nokto. Lian ĝojstaton kaŭzis ne men la fiero de la sukceso ol la ebrio, kiu lin regadis.

–Mi devus... mi devas min fridigi re, kaj pensi pri ĉio... mi ŝatas tion fari... kaj min enlitigi... sed ne dormemas... nu, iel dormemas. Aŭ mi trinku ion plian? Hi hi hi! –per nerva rido li mem premiis al si sian ŝercon.

**Kiel vi** surpiediĝis, iom ŝanceliĝis sed konservis la ekvilibron, kaj kun la helpo de la ŝranko, sur kiu li sin apogis, atingis la ŝaltilon de la plafona lampo kaj ĝian butonon premis.

Unuafoje la ĉambron lumigis potenca ampola lumo, miksiĝanta kun la lunlumo, kiu eniradis trafenestre. **Kiel Vi** fermis la okulojn por poiom kutimiĝi al ĝi. Li karesis al si la frunton per mano, kies raspa kaj humida tuŝo lin igis sorlevi la palpebrojn kaj rigardi.

Li kuntiris la brovojn, la vizaĝtrajtoj distordiĝis en grimacon. Ruĝaj makuloj sur la mano. Vino... ne, tio ne estas la koloro de la vino. Ili estas ruĝaj kiel sango...

**Kiel Vi** stumblis. Frosto komencis lin ataki, kaj debilo. Nun lia menso fulme reakiris pli men sian kutiman pensokapablon. Sen deigi la rigardon disde la mano, li paŝis al la fotelo kaj sin lasis fali sur ĝin. Li ne povis kredi. Ĉi tiam la rememoroj eksvarmis multiĝe en lia cerbo, kaj li kun kava voĉo ekrakontis kvazaŭ al si mem.

–Post la restado en la drinkejo Azio ĉiu el ni foriris sur sia vojo. Ni adiaŭis unu la alian. Mi, absolute ebria. Kantis kaj dancaĉis klaŭne surstrate. Kaj hazarde iris preter strato prostituitina. Unu ŝi min invitis, kaj mi, kun la penso en la kapo pri la blondulino, kaj kun la fiero el la huraoj, ne hezitis akcepti. Ni kunpaŝis, eniris aĉan konstruaĵon, grimpis ŝtuparon kaj envenis putran ĉambron. Ŝi estis tre bela, pure bela. Kaj mi, sur la lito, faris al ŝi... kruelaĵojn, torturis, ŝi kriis, jen de plezuro, jen plende pro doloro. Kaj mi bestie ŝin amoris, kaj ĝuis. Hura, hura, hura!, mi miavice kriis, mi ebriiĝis de la povo super tiu virino, kiun tiumomente mi posedis, mi povis fari al ŝi, kion mi volis, hura, hura!, la alkoholo freneze dancis en mia kapo, mi min sentis forta, supera, **vira**, mi rememoris la vortojn en miaj kompanoj min glorantajn, mi kriadis hura!, kiam mi ŝin fikadis, kaj ankaŭ... kiam mi kaptis la feran lampon kaj ekbatis per ĝi ŝian kapon kaj ĝojis, hura, hura, hura!, kaj kiam mi trempis manon en la sangon kriante hura, hura, HURA!!!

Li sin klinis kaj kaŝis la kapon inter la krurojn. Li sentis honton eĉ simple de tio, vidi sin viva. La vertiĝodona realo de lia ago ekriveliĝis al li, kaj li ne kuraĝis rigardi antaŭen, rigardi sin mem.

—Mi kure fuĝis ĉi tien, kaj forgesis, forgesis... kial mi faris tion, kial mi faris tian abomenindaĵon? —li veadis—. Mi estis ebria, ebria, ekster mi, la alkoholo...

Sinpravigoj ne decis. Ŝvito ekperlis sur la frunto, pezaj forpasis sekundoj.

—Mi estas absolute freneza.

Li konkludis post kurta medito. **Kiel Vi** movadis la kapon tien kaj reen, kvazaŭ tio servus por forviŝi la paseon. Sensecaĵo. Nun li ekpensis ankaŭ pri la leĝaj sekvoj de sia krimo: intenca mortigo, murdo, tridek jarojn en karcero por puno. Sed eblas, ke neniu vidis, kaj ke li povos sin forkaŝi! Cetere, temis nur pri putino.

—Nu, kio? Ĉu tio signifas, ke ŝi ne estis persono? Kaj ja vidis iu, mi vidis, kaj tio sufiĉas.

**Kiel Vi** stariĝis la lastan fojon kaj sin proksimigis al la fenestro, kiun li ovris. La friska aero de la nokto ŝtopis liajn pulmojn. Nun li rememoras, kio estas **Hura!**: la titolo de la libro, per kiu li gajnis la literaturan premion Dora. Li unua granda sukceso. Kiom li estis ricevonta? Ok... ne, dek milionojn.

—Kiom nur gravas tio? —li frustris.

La korpo krevis kiel sanga tripo pro la falego de la kvina etaĝo.

---

## INTERNACIE

---

Esperanto-klubo "SAMIDEANOJ". Volgograda regiono, u. VOLĴSKIJ—404130, Dvorec Kulturi "OKTJABR" SOVETA—UNIO. USSR. Informas: Al vi turnas sin la membroj de E-klubo de urbo Volĵskij. Amikoj, nia ĉefa celo estas la nepra estigo de amikecaj kontaktoj kun homoj de ĉiuj landoj per Esperanto.
Por tio ni proponas al vi interŝanĝi ekspoziciojn de pentraĵoj, plakoj kaj fotoj laŭ la temo: "Pacan ĉielon por vi, por ni, por ciuj".

RADIO PEKINO. Por festi la 40an datrevenon de Radio Pekino kaj pliintimigi la kontaktojn inter Radio Pekino kaj la aŭskultantoj, de marto ĝis septembro de la nuna jaro, petas siajn diverslandajn aŭskultantojn kontribui per sia verko pri la temo "Mi kaj Radio Pekino".
Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino por Eŭropo.

| GMT | Ondoj (m) | kHz |
|---|---|---|
| 20.00-20.30 | 40.1; 32; 30.1 | 7470; 9365; 9965 |

# "FUNDACION ESPERANTO"

## INTERNACIA LITERATURA KONKURSO

La Patronaro de "Fundación ESPERANTO" dum kunsido okazinta la 26-an de februaro de 1987, decidis organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto.

Estos premio kaj subpremio.

**PREMIO**

**"Juan Miguel Piquero"**

Premio, 10.000 pesetoj kun konfirma diplomo.
Subpremio, 5.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj infanaj rakontoj originalaj aŭ tradukitaj, verkitaj en facila lingvo, por ekinstrui Esperanton, al infanoj havantaj la aĝon de sep ĝis dek jaroj. La rakontoj povas esti ilustritaj aŭ nur literaturaj. Pro ĝia ebla eldonado la ilustraĵoj devos esti originalaj.

**REGULARO**

1) Ĉiu konkursaĵo ampleksu 2 – 3 foliojn (paĝojn).
2) Ĉiu konkursanto sendu kvin ekzemplerojn de la konkursaĵo tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj, kun la indiko: Por la Konkurso de "Fundación ESPERANTO".
3) La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la Konkursanto, kaj en aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
4) Kiam publikiĝos la Verdikto, publikiĝos samtempe la nomoj de la juĝintoj.
5) La datlimo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 30-an de septembro de 1987
   La Verdikto publikiĝos en la Tago de Zamenhof, la 15-an de decembro 1987
6) Oni sendu la tekstojn al Inés Gastón, P° de la Constitución, 35, 4° dcha. E-50001 ZARAGOZA Hispanujo.

Zaragoza la 5-an de marto de 1987

*Inés Gastón*
*Sekretariino de la*
*"Fundación ESPERANTO" kaj de la Konkurso*

---

Simpozio Internacia Interlingvistika "100 Jarojn da Esperantologio", organizita de IUEF kaj BEA, okazos de 4a ĝis 10a oktobro 1987 en IEK–Pisanica, Bulgario. Prelegos eminentaj esperantologoj kaj interlingvistoj de la mondo.

Secr.: P. de la Constitución. 35. 4° dcha
Teléfono 22 05 21

FUNDACION ESPERANTO

Internacia Literatura Konkurso

# VERDIKTO

La 3-an de decembro 1986 kunsidis la membroj de la Patronaro de Fundación ESPERANTO, S-ino M. Pilar Sancho Rebullida, S-ro Victor Ortiz, kaj F-ino Inés Gastón, sekretariino. Ankaŭ partoprenis la kunsidon, la membro de la Juĝkomisiono, D-ro José Olavide.

La sekretariino informis pri la poentoj asignitaj de ĉiu membro de la Juĝkomisiono, respektive S-ro Salvador Gumá (Reus, Hisp.), S-ro Gabriel Mora i Arana (Manresa, Hisp.) kaj D-ro José Olavide (Zaragoza, Hisp.).

Post trastudo de la informoj ricevitaj, jen la rezulto de la Konkurso:

Premio "Sancho Rebullida" estas aljuĝita al la konkursaĵo "La sonorilo de Van Willen", subskribita de **Willems.**

Subpremio "Sancho Rebullida" estas aljuĝita al la konkursaĵo "Fabelo el la insulo Ré: La Sorĉistinoj", subskribita **de Konigbaa.**

Tuj poste la sekretariino malfermis la identigajn kovertojn, kaj la aŭtoroj premiitaj estas:

Francisko Ksavero Moleono (Rotterdam, ML); Premio "Sancho Rebullida".

Bernard Aunis (Strasbourg, F.); Subpremio "Sancho Rebullida".

La Patronaro de Fundación ESPERANTO dankas al la Juĝintoj pro ilia kunlaboro, kaj al la partoprenintoj pro ilia entuziasma klopodo vivigi Esperanto per siaj verkoj.

Zaragoza (Hispanujo), la 15-an de decembro 1986

Inés Gastón
Sekretariino de Fundación ESPERANTO
kaj de la Konkurso

---

## INTERNACIE

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI**

21a Internacia Konferenco — Lodza Universitato. 17a ĝis 24a julio 1987, temo de la Konferenco:

"La Scienca Esploro de Esperanto el Pedagogia, Didaktika kaj Lingvo-politika Vidpunkto".

Adreso de Loka Konferenca Komitato: Pola Esperanto-Asocio-Filio en Lodzo — ul. Moniuszki 5, p.k. 337. PL 90—950 Tódź — Tel. (042) 32-65-03

# FONDAĴO LUISO MIMO ESPINALT

Kun la celo eldoni la verkojn **Kataluna Don Kiĥoto**, de Santiago Rosiñol, kaj **Donna Perfekta**, de Pérez Galdós, en la Esperanto-traduko de la karmemora esperantisto, s-ro Luis Mimó Espinalt, estas starigita FONDAĴO LUISO MIMO ESPINALT, sub la gvidado de komisiono, konsistanta en la jenaj membroj: V. Hernandez Llusera, Salvador Aragay, R. Manau Torres, M. Gutierrez Adúriz kaj sinjorino Mimó.

Okaze de la 47a Hispana Kongreso en Madrido, la komisiono decidis unuatempe presigi la verkon **Kataluna Don Kiĥoto**, por kio la komisiono esperas ricevi la apogon kaj de la katalunaj esperantistoj kaj ankaŭ de la Esperanto-Asocioj el Katalunio. Oni certigas favoran prezon al ĉiuj antaŭmendoj. La unua verko kostos 950 pesetojn.

**UNUAJ SUBVENCIANTOJ**

| | |
|---|---|
| KULTURA ASOCIO ESPERANTISTA de Katalunio | 76.000 p-tojn |
| BARCELONA ESPERANTO–CENTRO | 15.000 " |
| HISPANA ESPERANTO–FEDERACIO | 20.000 " |
| LLIBRERIA ESPERANTO | 15.000 " |
| Entute ... | 125.000 p-tojn |

**ANTAŬMENDOJ**

| | |
|---|---|
| ASTURA ESPERANTO–ASOCIO | 10 ekzemplerojn |
| ESPERANTO GRUPO CALLOSA DE SEGURA | 10 " |
| GRUPO ESPERANTISTA DE ALICANTE | 10 " |
| Entute ... | 30 ekzemplerojn |

Monsendojn kun antaŭmendojn bonvolu adresi al:
FONDAĴO LUISO MIMO ESPINALT, Carreras Candi 34 - 36, 08028 - Barcelono

La Komiisono informos pri la demarŝoj kaj pliaj antaŭmendoj pere de la bulteno de KAE, Kultura Asocio Esperantista kaj la bulteno de Hispana Esperanto-Federacio.

*Salvador Aragay*
*Sekretario de FONDAĴO*
*LUISO MIMO ESPINALT*

# PAĜOJ EL LA HISPANA BELETRO
## JUAN RUIZ – Arkipastro de Hita (? 1283–1355)

Elstara verkisto en la 14a jarcento, grava kastilia poeto, aŭtoro de unu el la plej gravaj verkoj de la Hispana Literaturo, "Libro de la Bona Amo", kiu enhavas pli ol 1700 strofojn, kiuj heterogene temas, pri elementoj diversaj: rakontaj, doktrinaj kaj lirikaj. Ĝi estas, kvazaŭ pikareska novelo, en kiu la verkisto intermetis pecojn diversajn en majstra unueco de stilo kaj formo: de amaj aventuroj travivitaj de la aŭtoro mem, ĝis religiaj poemoj rilate Nian Sinjorinon kaj la Kristopasionon, fabeloj, rakontoj satiraj kaj burleskaj, lirikaj epizodoj kaj eĉ doktrinaj moralaj konsiloj...

Juan Ruiz studis en Toledo, kie li estis enkarcerigita de la ĉefepiskopo Gil de Albornoz. En la malliberejo li skribis sian belan verkon, kies metrika formo tute ne alĝustiĝas al la tiutempa "cuaderna via" (strofo konsistanta de kvar aleksandraj versoj unurimaj konsonantigitaj). Efektive, el la diverseco de metriko kaj strofoj en liaj versoj oni inklinas dedukti, ke lia stilo estas pli proksima al tiu de la trobadoroj ol al tiu uzata en lia epoko.

La Arkipastro de Hita, estis la unua aŭtoro uzanta aŭtobiografiajn rakontojn, majstris per bela stilo la versfaradon, kaj estis akra observanto de la reala vivo, kiun li poste priskribis per vivkoloraj vortoj, ofta uzo de popolaj terminoj kaj saĝaj kolokvaj komentarioj, kiuj nuancis lian poezion de gracia logiko kaj diverseco ĉiam altira.

Kiel ekzemplon de la poezio de Juan Ruiz, mi elektis poemon tradukitan de nia karmemora samideano Jaume Grau Casas, iama Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj elstara poeto. Jen la menciita poemo:

**"Ekzemplo pri la ecoj, kiujn mona havas"**

Multon faras la mono, ĝi tre indas je am',
ĝi igas la stultulon ĝuanto de bonfam',
ĝi kurigas eĉ tiun suferantan pro lam',
la monon volas preni eĉ kripulo sen man',

lun homon sen scio, kun plej kruda labor'.
mono igas nobelon plenkovrita de glor',
ju pli da riĉeco, des pli multe da valor',
kiu monon ne havas, ne aŭdas: Jes sinjor'!

Se vi posedos monon, vi vivos sen ĉagren',
kun ĝojo kaj plezuro, kun neniom da ĝen',
aĉetos paradizon, gajnos savon sen pen',
kie multe da mono, tie multe da ben'.

Mi ja vidis en Romo, kie estas sanktec',
ke ĉiuj antaŭ mono restas en humilec',
honoron al ĝi faras per granda solenec',
al ĝi ĉiuj humilas al majestec'.

Mono estas urbestro, juĝisto tre laŭdata
tre taŭga konsilisto kun subtil'advokata,
agento tre efika kaj tre konsiderata
kaj en ĉiuj metioj tre bonopiniata.

Resume mi parolas, komprenu larĝe vi
de la mond'agitanto tre granda estas ĝi,
ĉar sinjoro, servanton igas ĝia magi';
ĉio monda fariĝas nur pro ĝia pasi'.

En la "Libro de la Bona Amo" oni trovas la plej belan poezion de la Mezepoko, kaj per tiu verko, la Arkipastro de Hita, montras stilon kaj aliajn beletrajn karakterizojn, kiuj poste aperos en la plej gravaj literaturaj skoloj.

**A. Marco Botella**

## ALVOKO AL LA KURSGVIDANTOJ !

Ĉiu kursgvidanto okaze de la Jubilea Jaro, kaj laŭ deziro de s-ino Teresa de Mimó, ricevos senpage du librojn por premii la du plej kapablajn lernantojn. La libroj estas: Don Juan Tenorio kaj Du Komedioj.

Estas nenia postulo por ricevi la librojn, sed s-ino Teresa de Mimó, dankus, se la premiita lernanto skribus al ŝi, siajn opiniojn pri la enhavo de la libroj kaj la traduko-stilo de sia edzo, la prestiĝa gramatikisto Luis Mimó. Maksimume la skribaĵo estu unu folio je duobla interspaco.

Por peto de la libro kaj ebla sendo de la opinioj, skribu al: Luis Serrano Pèrez. Font Nova, 32 – 08202 SABADELL

## INTERNACIE

Post la jubilea kongreso en Varsovio, Jugoslavio bonvenigas geesperantistojn partopreni en kultura evento "100 jaroj de Esperanto-Kulturo".

Organizas ĝin Kroatia Esperanto-Ligo sub aŭspicio de UEA en la tempo inter la 2a kaj la 9a de aŭgusto 87.

Por pliaj informoj bonvolu vin turni al: Kroatia Esperanto-Ligo, Yu 41000 Zagreb, Amruševa 5, Jugoslavio.

# HEF – SIDEJO EN BARCELONO

**NOVAJ MEMBROJ:** José Ignacio Bravo, Conrado Medina, Amelia Epi, Amparo Felipe, Frederiko Suarez, José Ignacio Bravo Lupianes, Asunción Angeles Diaz, María José Ortiz, Lluis Febrero, Ferriol Masip.

**UNUA DUMVIVA MEMBRO EN 1987.** Asunción Angeles Diez

**AVIADILA KARAVANO AL VARSOVIO 1987 POLLANDO**

Oficiala agentejo: VIAJES IBERIA, Rambla Estudios 130, 08002 BARCELONA. Tel. 317 93 20.

Tago de la eliro, 22a de julio (merkrede). Tago de la reveno, 2a de aŭgusto (dimanĉo)

Ni informas ke nepre, oni devas mendi kune, la aviadilan vojaĝon kaj la duonan pensionon dum 11 tagoj en unuaklasa hotelo. La kosto estas 103.800 p-toj. (Vidu klarigojn en la bulteno n-ro 278). La prezo ne inkluzivas: ekskursojn, kulturajn vizitojn, bankedon, nek la aliĝon al la kongreso.

**NOVAJ ESPERANTO-ASOCIOJ ALIĜINTAJ AL H.E.F.**

GALLEGA ESPERANTO–ASOCIO Apartado 714. 15780 Santiago de Compostela.

I.L.E.I. M. López Hernández, Sol 75, 41003 – Sevilla.

ESPERANTO GRUPO en Centro Cultural Almuzafes, Ausias Marc s/n 46440 – ALMUZAFES.

**KOMERCAJ ANONCOJ.** Memoru, ke BOLETIN AKCEPTAS KOMERCAJN ANONCOJN sur la kovrilo en la lasta paĝo.

| | | |
|---|---|---|
| PREZOJ: | Tutpaĝa anonco: | 15.000 p-tojn |
| | Duonpaĝa anonco: | 8.000 " |
| | Kvaronpaĝa anonco: | 5.000 " |

Specialaj prezoj por membroj de HEF kaj eldonistoj. Petojn kaj pagojn al HEF, Carreras Candi 34, 08028 – Barcelono.

## NEKROLOGO

La nekompatema morto forrabis, la 30an de Aprilo, nian entuziasman kaj karmemoran samideanon JUAN ASENSI IRENI. Li estis inter ni, la plej veterana esperantisto el Alicante.

Grupo Esperanto Alicante kaj HEF esprimas sian kondolencon al lia vidvino kaj filino Concepción.

# FIDELECO

Kun kelkaj amikoj mi estis en vinberejo kiu troviĝas sur altaĵo malantaŭe de nia belega urbo Varna.

Estis aŭtuno. La dommastroj de la vinverejo marŝis atente en ĝi rigardante la grandajn pezajn, diverskoloraj vinbergrapolojn, kaj pensis, ke baldaŭ oni devas kolekti ilin.

Mi sidis sub pomarbo, kies branĉoj estis superŝutitaj je fruktoj.

Mi rigardis la urbon, kiu kuŝis sub la deklivoj, kie troviĝis la vinberejoj, kaj la maron, kiu brilis en la malproksimeco.

Unu el la amikoj diris al mi:

— Mi scias, ke vi ŝatas kolekti interesajn okazojn por poste priskribi ilin. Ĉu vi volas aŭskulti unu?

— Bone —mi respondis—. Tio okazis — li komencis — al mia onklo Stojan, kiam li ankoraŭ loĝis en vilaĝo. En la jaro 1928, se vi memoras, la vintro komencis frue, kaj estis neordinara malvarma.

Frumatene en tiu aŭtuno, onklo Stojan iri al la agro por plugi ĝin. La vetero estis malvarma. La ĉielo estis kovrita de nigraj nuboj. Post du horoj komenciĝis forta, malvarma pluvo, kiu baldaŭ miksiĝis kun neĝo. Onklo Stojan vidis, ke li ne plu povas plugi. Li jungis la bovojn, kun kiuj li estis pluginta, al la veturilo, kaj direktiĝis al la vilaĝo.

Li kovris sin bone per kapoto, ĉar la vento forte blovis en diversaj direktoj, portante pluvon miksitan kun neĝo.

Malantaŭ vojkruciĝo, en malproksima valo, onklo Stojan estis surprizita vidi multe da gruoj dense starantaj unu apud alia.

Ĝojege, onklo Stojan, iris al gruoj, kiuj estis preskaŭ frostiĝintaj, kolektis ilin kaj ilin metis en la veturilon. Ili estis 63. Poste li feliĉe daŭrigis la veturon, ne plu atentante la malvarman veteron. Li revis pri la gruoj. Iujn el ili li vendos, aliajn buĉos kaj alportos al siaj parencoj, ĉe kiuj dum kelkaj tagoj gastis lia edzino kun la infanoj.

Reveninte hejmen, li metis la gruojn en la stalon kaj iris varmigi sin en la ĉambro. Post kelkaj horoj onklo Stojan iris en la stalon, kaj vidis ke la gruoj reviviĝis. Li donis al ili nutraĵon, revante ke poste li manĝos ilin.

Sed en la sekva nokto, li sonĝis neordinaran sonĝon. Venis al estaĵo tute stranga. La korpo estis-homa, sed la kapo kaj flugiloj —gruaj. Tiu estaĵo rigardis severe onklon Stojan kaj montris al li la gruojn kaj poste la ĉielon.—

Vekiĝinte, onklo Stojan ne povis denove ekdormi. Ĝis la mateno li pensis pri tiu stranga sonĝo. Li klare komprenis, ke li devas liberigi la gruojn. Sed li ne volis tion fari. Li deziris gajni monon per ili kaj manĝi ilian viandon. Sed io en lia memo ne permesis tion fari.

Tagmeze la vetero pliboniĝis. Fine, post longa pensado, onklo Stojan decidis liberigi la gruojn, sed ne ĉiujn. Li lasis tri el ili en la stalo, ĉar li forte deziris manĝi ilin.

La liberigitaj 60 gruoj flugis al la ĉielo, sed ne foriris kaj komencis ŝvebi en rondo super la korto de onklo Stojan. Li rigardis ilin mirigite, sed trankviligis sin, ke ili fine tamen forflugos. Li eniris en la domon kaj kiam li denove eliris, li vidis, ke la gruoj ĉiam ankoraŭ flugas en la rondo super la korto, alte en la ĉielo. Tiam li komprenis, ke ili ne forflugos sen siaj amikoj, kiuj restis en la stalo. Lia koro profunde kortuŝiĝis pro la granda amo de la gruoj, kaj liberigis ankaŭ la lastajn tri gruojn. Ili ekflugis al la ĉielo. Tiam ĉiuj gruoj kun forta krio ankoraŭfoje flugis en rondo super la korto kaj flugis for.

Longe onklo Stojan rigardis post ili kaj mirigite balancis la kapon, pensante pri la mirinda fideleco de tiuj stultaj birdoj, kiel oni nomas ilin, kaj kun granda plezuro manĝus ilin.

—Sed ĉu vere, ke ili estas stultaj? — pensis ĝis malfrua nokto onklo Stojan...

—La amiko, kiu rakontis la okazon, eksilentis. Ankaŭ mi silentis pensante pri la naturo, pri la bestoj, pri la birdoj. Ĉu ni konas ilin? Ĉu ni komprenas, ke ankaŭ ili suferas, amas kaj povas montri sian fidelecon?

Bedaŭrinde, ĉiuj homoj ankoraŭ — ne.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

P.S. Tute vera okazo!

*Nevena Nedelĉeva*

## INTERNACIE

22a JUGOSLAVIA ESPERANTO—KONGRESO en kadro de la jugoslavia celebrado de la Centjara jubileo de Esperanto — Banja Luka, 19a ĝis 21a junio 1987. Godine LKK de 22a Kongreso de JEL, (Esperanto—Ligo)
B. Kidriĉa bb. 78000 BANJA LUKA. Jugoslavio.

Esperantistaj feriadoj en MIEDZYGÓRZE. La Vroclava Filio de Pola Esperanto-Asocio ofertas al vi agrablan ripozon kaj multajn amikajn kontaktojn kun diverslandaj esperantistoj. Du internaciaj feriadoj: "Esperanto hejme" 2-15an de aŭguso 1987, kaj "Ora pola aŭtuno" 2-15an de septembro 1987.— Pola Esperanto-Asocio, PO kesto 16, Pl 50—952 WROCLAW 17, Polllando.

# ESPERANTO KAJ OLIMPIAJ LUDOJ 1992

Je 16 oktobro, okdeksesa jaro, en Ĝenevo la aŭtoritatuloj pri sporto voĉdone decidis pri Barcelono, Hispanujo, kiel la plej bona loko por la Olimpiaj ludoj en la jaro 1992. Adamo Goralski parolis ĉe la Radio Nacia kaj proponis la ĉefurbon de Katalunio kiel la plej indan lokon kaj Esperanton, kiel neŭtralan, internacian lingvon, kiel la plej indan helplingvon. La reprezentantoj nek kongruis nek konsentis. Do, en tiu ĉi tago ekĝermis la ideo de kampanjo pro la enkonduko de Esperanto en la Olimpiajn ludojn. Sekve Adamo Goralski kiel membro de la Esperanto-grupo en Tenerife aperigis la unuan artikolon sub la titolo "Kial ne estas eble?". Interalie presis ĝin ĵurnalo "El Día" (La Tago) de Santa Cruz de Tenerife kaj iom post iom alvenis kelkaj respondoj. Elstaris la pozitiva letero de la Prezidanto de Katalunio, Ekscelenca Sinjoro Jordi Pujol, due, de la kultura fako de la urbestrejo de Barcelono. Hispana kaporganizo HEF entuziasme aliĝis al ĉi tiu ideo.

Ni devas konsideri, ke ankoraŭ mankas ĝis la dato pli ol kvin jaroj. Ni havas antaŭ ni sufiĉe da tempo ne nur por la kampanjo, sed precipe por iniciati pli ol dek kursojn sur kvin kontinentoj. Sciate estas, ke ĉi tiu intenco ne estas nova. Antaŭ jaroj oni eĉ eldonis vortareton pri sporto, ktp. Sed nun oni devus duobligi, eĉ multobligi niajn penojn kaj fortege klopodi je ciuj intermaciaj kaj landaj organizoj, komencante de la kapkomitato pri la Olimpikoj, kaj insisti en ĉiuj landoj sur ministeria nivelo. Poste, ankoraŭ penetradi sportajn klubojn en ĉiuj urboj.

Ni, karaj gesamideanoj, havas ĉie multegon da amikoj, ne gravas ke ili ne estas esperantistoj, kaj ĝuste per nacilingvaj leteroj ni povus direktiĝi al la aŭtoritatoj, ĉu grupe, ĉu unuope, per apogantaj argumentoj, telegramoj eĉ telefonaj interparoloj. Bonvolu ne opinii, ke ĉi tiu tasko estos por ni tro dura aŭ donkiĥoteska. Tiuj ĉi tuj aŭdos la ege klaran respondon, ke ĉio eblas per konstanta laboro. Tiamaniere ni antaŭpaŝu, neniam flankiĝante kaj atendos nin certa sukceso.

Oni atentigas ĉiujn samideanojn, gelegantojn de ĉi tiu artikolo, ke tiu ĉi klopodado havas ankoraŭ alian faceton. Povus antaŭ ni malfermiĝi facila vojo, almenaŭ pado, por la junularo. Eble ili konvinkiĝos kaj agnoskos, ke per la internacia kaj neŭtrala helplingvo, tiel sur la sportejoj kiel sur la stadionoj, ili facile interkompreniĝos. Se ĉi tiu pensmaniero disvastiĝus inter la gejunuloj, tiam la lernado de Esperanto estiĝus moderna kaj sekve tre necesa, tiel sama grava kiel novaj kanzonoj aŭ la nuna stranga harfrizado.

Ni esperas, ke la tuta esperantistaro instigite de niaj gazetoj kaj bultenoj volonte eniros en la kampanjon, kaj survoje scipovos venki la eventualajn obstaklojn, por atingi kiel la necesan reklamon por Esperanto, eĉ post la Olimpiaj ludoj de 1992.

*ESTO, grupo de Esperanto. Santa Cruz de Tenerife.*
*Verkis Adamo Paŭlo Goralski.*

# RECENZOJ

**Kiamaniere distingi la fungojn?** Mario Simondetti. Eldono Gabrielli. 64 p. Formato 21 x 14,5 cm. Prezo 800 p-toj. Tekstoj en Esperanto kaj itala lingvo.

La verko apartenas al la nomata populara scienco kaj en ĝi la aŭtoro traktas pri tio menciita en la titolo "Kiamaniere distingi la fungojn?" Tiu ditingo, krom botanika, plejparte rilatas al la distingo inter manĝeblaj kaj venenaj fungoj, speciale pri la mortiga **Amanita phalloide**, kiu tiom da venenaj mortoj okazigas ĉiujare. La libro estas ilustrita per desegnoj kaj eĉ enhavas aldonon pri rikolto, kuirado kaj manĝado.

* * *

**Ĉu rakonti novele?** Johán Valano. Eldono de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno. 144 p. Formato 21 x 14,5 cm. Prezo 1.150 p-toj. Serio "Stafeto", n-ro 1a. Krim-noveloj. Ĝi estas originale verkita en Esperanto kaj enhavas dekunu krim-rakontojn, kiuj jam aperis en la magazino "Monato" en la jaro 1981, kio jam estas atesto pri ĝia kvalito. La esperanta literaturo ja enhavas ĉiujn diversajn branĉojn de la moderna literaturo kaj tiu ĉi verko atestas pri la branĉo de krim-noveloj. Estas rimarkinde, ke la nomoj de personoj, stratoj kaj geografiaj lokoj havas esperantajn radikojn, kio vere estas originala, ĉar ordinare oni nur esperantigas la nomojn de la diversaj lingvoj. Propra esperanto-literaturo bezonas esperantajn nomojn sendependajn de kiu ajn nacia lingvo, ĉar Esperanto estas universala.

* * *

**Cuñataí Porá**. 20 p. Broŝuro verkita de Katalin. Eldonita de Astura Esperanto-Asocio. La verko estas rakonto de tragedio okazinta meze de ĝangalo en Sud-Ameriko inter indianoj kaj blankuloj en kontrasto al diverseco de moroj, sed komuneco de profundaj sentoj. La dramo spegulas la subpremadon de la indianoj fare de la blankuloj. La stilo estas flua kaj invitas al senhalta legado ĝis la fino. **Ciñataí Porá** estas la nomo de la rolantino, kiun en gvaraniaj vortoj signifas "Belan Knabinon".

**G.M.E.**

---

**INTERNACIE**

La jara internacia renkontiĝo de esperantistaj geinstruistoj (Freinet-pedagogio) okazos en POZNAN (Pollando) de la 12a ĝis la 22a de julio 1987. Sin turni al: Paul Poisson, 239 rue Victor Hugo, F-37540 ST-CYR-SUR-LOIRE (Francio) aŭ al: Euzebiuszy Drzewiecki, ul Swit 2A m7, 60-375 POZNAN (Pollando).

# POEZIA ANGULO

### ĈE MARO...

Memore, mi nun estas en olda pejzaĝo:
la nefinebla maro, la ĉielo senlima,
pacema ĉirkaŭaĵo,
sola, mi, promenante sur la plaĝo kutima.

Denove la susuro de la ŝaŭmanta ondo,
la mistera parolo karesanta de l'vento.
La malgajec' de l' mondo
premanta mian koron dum eterna momento.

Kiel tiam, mi sentas la saman nostalgion
je deziroj falintaj kaj foriĝintaj revoj.
Mi pensas plu nenion:
nur ŝia nomo venas kaj iras kun la mevoj.

Kiel tiam, absorba mia rigardo vagas
kvazaŭ serĉante ombron de prezenco mistera.
Mia penso imagas,
ripetas ŝian nomon kiel preĝon ĥimeran.

Ŝia nomo, sur sablo grandlitere skribita,
sube de ĝi, mi skizas sago-vunditan koron.
Mia anino, sorĉita,
rigardas, for-de-l'tempo. altvaloran trezoron.

Ŝaŭmanta ventumilo sablon karesas mole
murmure forviŝanta skizon kaj literon.
Ondoj ludas petole
kaj sur la sablo lasas nur la mutan misteron.

*José F. Arroyo*

(originale verkita en E-o)

### ĈE NUBOJ...

Tra l' ĉielo de l' vespero
ruĝa, longa, kalmoplena,
lantaj flugas blankaj nuboj
kun majesta flug' solena.

De la ponto mi rigardas
la senfinan ebenaĵon:
la mortanta suno pentras
lumviolan pejzaĝon.

Mi revadas, la rigardo
tra la nuboj forrabita;
ĉe la penso sen ideo,
nur imago difinita.

Nur imago kiu prenas
novan formon ĉe la vento
kaj fariĝas nostalgio
en la fundo de la sento.

Kaj la sento flugas reve
kaj la revo for foriras.
La memor' de ŝia nomo
ĝis la nuboj supreniras.

Ŝia nomo estas nubo
forpelita de la brizo,
sed, ĉiele, alte flugas
kruca morto, nigra nizo.

*José F. Arroyo*

(Originale en E-o)

**DEZIRAS KORESPONDI**

Mi partoprenos ĉi-jare en la pollanda Universala Esperanto-Kongreso, kie mi deziras renkontiĝi kun eksterlandaj gejunuloj. Pincezés György. Szigetszentmiklós. Gyári út 7/c, H-2310 Hungario. — — Anton Blickman. Palamedesstraat, 17. 2026 VV HAARLEMO. Nederlando. Pri tridimensiona kaj proksima fotografioj; orkideoj, kaj papilioj. — — D-ro Robert Simmonds. 122A RD 1 ONEONTA. NY 13820 Usono. Mi estas kvindekkvarjara viro, profesoro de geologio. — — Waldemar Rosahowski. Str. Wojska Polskiego 56/1. 19-300 ETK. Pollando (42-jara inĝeniero elektroteknikisto). Pri ĉiuj temoj, kaj interŝanĝi bildkartojn kaj esperantaĵojn. — — Jaromir Pola'k. 671 61 PROSIKCRICE-149. Ĉekoslovakio. 41-jara instruisto pri geografio. — — Uborie Luise Botto, elementa instruistino. Ŝiaj lernantoj volas korespondi kun elementaj hispanaj lernantoj. Scuole elementari. Via Hanzi, 28050 NOVARA. Italio. — — Hanna Heinrich — 47 jaraĝa historistino — 93-509 LODZ ul. Gagarina, 29, 50, Pollando. — — Machlik Mario, dudek-jara studento de muzika Altlernejo, kun esperantistaj gemuzikistoj.— Hungario — KAPOSVAR Léva Köz 2, III/4 7400. — — Hohano Kopytek, dekok-jara, pri geografio, vojaĝoj; kolektas mapojn kaj urboplanojn.— AL REW, PAZDZ. 184/48 — 43-100 TYCHY. Pollando. — — Amika junulgrupo, gekomencantoj, por ekkoni kiel vi vivas kaj organizi reciprokajn vizitojn.— Erzséber Sebök — 1201 BUDAPEST — Klaaka u. 38 — Hungario. — — Dudekjara fraŭlino kun junulo 20-25 jara pri nia lando kaj popolo — Nóna Somogeji — BALABONLOZSOK — Tö u. 95 — 8131 Hungario. — — Mi estas profesia lingvisto, precipe interesiĝanta pri la lingvoj, kulturoj kaj historio de la landoj de la Malproksima Oriento, kaj deziras korespondi kun samideanoj de ia ajn aĝo. Peter Lang. 64 Hearnville Road. Balham. London SW12 8RR. Britio. — — 16 jara hungaria lernantino kun knabo aŭ knabino. Bedó Katalin. OROSZLÁNY, Népekbarátsága út 52. 4/14., 2840 Hungario. — — Juna hungara knabo kun geknaboj. Simon Lajos, Tét, FÚ ÚT 28. H-9100. Gröe-Sopron Hegre. Hungario. Interesiĝas pri literaturo, filozofio, historio kaj estas adepto de la jogo.

---

**NIAJ GRUPOJ**

---

VALLADOLID.— La pasintan 20an de februaro, la loka ĵurnalo "EL NORTE DE CASTILLA" publikigis ampleksan, tri kolumnajn, artikolon titolitan "CIEN AÑOS ENTENDIÉNDOSE EN ESPERANTO" (Cent jarojn interkompreniĝante per Esperanto). Ĉar la menciita artikolo estis sendita de la hispana presagentejo EFE, eble ĝi estos publikigita en diversaj hispanaj ĵurnaloj.

CAJA DE AHORROS Y MONTE DE PIEDAD
DE
ZARAGOZA, ARAGÓN Y RIOJA

DEPARTAMENTO DE COMUNICACION SOCIAL

Plaza de Basilio Paraiso, 2
Teléfono 22 49 41 *
50008 ZARAGOZA

Zaragoza, 6 de Febrero de 1987

Sr. D. Salvador Aragay i Galbany
Presidente de HISPANIA ESPERANTA
FEDERACIO
Barcelona

Muy Sr. nuestro:

Adjunto le devolvemos la copia del libro EL DOCTOR ESPERANTO: L.L. ZAMENHOFF, APOSTOL DE LA PAZ, de Dr Fernando de la Puente Solsona, sintiendo comunicarle la imposibilidad de subvencionar su edición, tal y como Vd. nos proponía en su carta del ppdo. día 26 de Enero.

No obstante, nuestra Entidad adquiriría 150 Ejemplares de dicha obra, una vez editada, al precio de 595 Ptas/ejem., tal y como Vds. nos indicaban en el presupuesto que nos adjuntaron.

Por tanto, una vez hayan concluido la edición de los libros, les rogamos se pongan en contacto con nosotros para que podamos indicarles en dónde deberán situárnoslos.

Asi mismo, le rogamos nos proporcionen una lista de los esperantistas residentes en Aragón, Rioja y Guadalajara, que pertenezcan a su Federación.

Un cordial saludo.

Román Alcalá Pérez
JEFE DEL DEPARTAMENTO